GISTO, OKT, 2005.
G.O. VASKE
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.

HELPOPETO

De multaj jaroj mi uzas kaj proponas al gesamideanoj vastan uzadon de senkovertaj posxtkartoj kaj aerogramoj, faritaj el simpla kvaroble falditaj A4 paperfolioj (oficgrandaj), kun ekstera E-reklama presitajxo. Ili farigxas chipaj E-propagandiloj. Eblas ech aldoni plian paperfolion, se necese, sen aldona posxta tarifo. - La posxtkarto same kiel la aerogramo permesas al scivolemaj homoj iom “spioni” pri kio la geesparantistoj traktas en siaj komunikadoj. Tia, preskau malferma kaj praktika rimedo korespondi, lau mi ege stimulas kaj multobligas kontaktojn inter ni chiuj, tial akcelas la progreson en lertigxo pri E-uzado. Chu mi ne pravas? – Al chiu Gisto-leganto mi petegas indiki al mi, kio ne plachas al vi rilate al uzado de Pk kaj aerogramoj. Dum la 40ª BKE mi volis alparoli la cheestantaron. Mankis oportuno.

JES au NE?

Oni esperas ke chiu el ni, antau ol vochdoni, prikonsideris la fakton bone diskonigatan de la brazila Preso ke, chefe en RIO, la Polico kapitulaciis, ke la banditaro libere regas favelojn kaj ordonas komercistojn fermi la pordojn. Ech la Armeo helpis kelkan tempon sed la bandita regado dauras. La polica fako en jxurnaloj de nia regiono ofte komentas mankon de veturilo, de benzino, de homoj, kiam atakataj en siaj logxejoj, poste plendas ke la helpo venis nur post kvaronhoro au ech multe pli da tempo, malgrau helpopeto sendita per posxtelefono. Tio, por ne paroli pri cirkonstancoj multe pli dangxeraj kiujn spertas kamparanaj familioj.- Cetere aldonindas ke, post kiam armilotenado de civiluloj estas malpermesata, amase proliferas didelfoj, ech en urboj! De du jaroj mia paro de Sinalejro-rasaj anseroj nestas, mi esperas idojn sed en chiu jaro didelfo formangxas la ovojn. Jxus denove tio okazis! Chu farmistoj devas gardosxtari che nestoj, nur pro tio ke ne eblas eviti predadon per sxtipo? Kamparaj produktajxoj konsekvence farigxos pli multekostaj.

El la SENEKA-pensejo.

Se stultulo sukcesas percepti siajn stultajxojn, tio signifas ke li ekinteligentas sed, se li komencas opinii sin inteligenta, pruvigxos ke li fakte estas nesciulo.

ĈRI

Lastatempe ĈRI tre kontentigas sudamerikajn auskultantojn. Gxia signalo restadas che S-9+ lau la frekvenco 9860 Khc. – Per S-9 oni interpretu: komforta audebleco. Kun plus-signalo, oni komprenu ke la sonvolumo estas pli ol sufiche forta, sen atmosferaj bruoj, sen QRM (intermiksoj de flankaj stacioj. Tial, vi chiuj kiuj balbutas antau ol en la menso trovi la gxustan vorton direndan dum babilado, "religie" auskultu chiutage la modelajn paroladojn de ĈRI-geparolistoj. Ankau komputilistoj, se vi ne havas bonan radioricevilon, diligente auskultu ĈRI! - Sed memoru ke nialanda tempo sxangxigxis. Nun oni sxaltu la radion, lau nia tempo, t.e., je la 20,00h. Rekte el Chinio oni povas audas ne-kribritajn novajxojn kaj chiam audeblas eroj pri la E-movado tra la mondo. – Kvazau paradigmo audigas sian vochon la emerita parolistino Roza, per pokaj vortoj: "Bonan vesperon, nun ni komencas nian elsendon en Esperanto". Vi kontrolu!

Al ĈRI-estraro mi dankas, se vi priatentis mian peton, ke Rosa ne forlasu definitive sian auskultantaron. Sxi devus esti veninta al nia BKE en Porto Alegre, por ke a brazila auskultantaro konatigxu kun la talenta parolistino.

MISTAJPO

Sudbrazila geo volis gxui negxajn sportojn en la najbara lando Argentina, che la charma urbo Bariloche kie ili, 20 jarojn antaue pasigis la mielmonaton. Pro manko de sidlokoj en sama aviadilo, ili decidis ke la edzo flugu tuj kaj sxi la sekvan tagon. Alveninta kaj jam gastigita en hotelo, la edzo decidis sendi al sxi mesagxon sed, forgesis tajpi unu literon en la adreso de la e-mesagxo. Tio kauzis ke ie en la mondo, vidvino jxus reveninta de la entombigo de sxia edzo, iris al sia komputilo kontroli chu alvenis mesagxoj de parencoj. Tuj post legi la unuan mesagxon sxi ekkriis kaj svenis. Sxia filo envenis la chambron kaj trovis sian patrinon falintan sur la plankon. Li legis la surekranan mesagxon: Mia kara edzino, eblas diveni ke vi surprizigxas pro la alveno de chi mesagxo far mi. La hotelo estas nova, la servo bonas, mi komforte instaligxis kaj oni disponas komputilon, por kontakti siajn gefamilianojn. Chio pretas, por akcepti vin morgau. Esperoplena mi atendas vian alvenon. Mi deziras al vi serenan veturon, kiel estis la mia. Chi tie oni havas la impreson ke ne plu ekzistas tero, pro tie granda amaso da negxo, kien ajn oni rigardas.

Por kiu ne legis chi-etan anekdoton en DG:

- Sinjoro, via hundo persekutis kaj atakis mian bubon sur biciklo.
- Mia kara sinjoro, tutcerte estis ne mia hundo. Gxi ne biciklas !